

POLA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO DE POLAJ ESPERANTISTOJ.

JARO XVII

WARSAWA — OKTOBRO 1922 J.

№ 1 (87)

Al Polaj Esperantistoj.

Karaj legantoj!


Ni faras al Vi surprizon, reeldonante la „Polan Esperantiston“. La ago estas kuraga kaj riska en nia nuna financa situo. Kelkaj oferemaj samideanoj *opiniis* tamen, ke venis jam la tempo elprovi tiurilate la korojn kaj la poŝojn de polaj esperantistoj. La komencon, kiu ĉiam estas plej malfacila, ili prenis sur sin, esperante, ke vi, dispelita birdaro, kunflugos al la alvoko, kun mono, kun ideoj, kaj kreos la neston, de kie esperanta voĉo reŝutiĝos en nia libera Pollando.

Diskatenitaj ni estas nune kaj neniam malamika mano pesos la frapojn de nia koro. Ni povas diri laŭte al la tutmonda esperantistaro, *klaj sentoj kaj idealoj regas la polan taĉmenton en la Esperanta Armeo*. Ni povas al ĝi rakonti, *kian volon en la monda Civiltzo ludis kaj ludas la Pola Nacio*, kia estas ĝia nuna kunlaboro al la bonstato kaj progreso de Homaro.

Al pola esperantistaro ni volas ĉiam doni precizajn kaj verajn sciigojn pri *esperanta movado*, precipe pri la *movado en Pollando*, al la neesperanta pola publiko-pole redaktatan *Kronikon pri ĉefaj okazintaĵoj en Esperantujo*.

En la fako „Komunikoj“, ni presados informojn, ricevitaj de pollandaj Esperanto-Grupigoj. La Estraro de Pola

102281



Esperantista Societo jam promesis al ni informi nin re-
gule pri la vivo de sia Varsovia Centrejo kaj Urbaj Gru-
poj. Ni farigas tiamaniere plej certa kaj necesa gvidilo
por ĉiu membro de P. E. S., kaj, ni esperas, *kunligilo de*
ĉiuj pollandaj esperantistoj.

Ne forgesemaj ankaŭ pri *esperanta Poezio kaj Lite-
raturo*, ni plene konscias la gravan respondecon, kiun
kreas por ni tiurilate la glora pasinteco de „Pola Esper-
antisto“ kaj la unuaranga rolo de Pollando en esperanta
verkaro.

Ni sorge flegos la trezoron de bela lingvo Zamenhofs,
kaj memorante pri grandaj ekzemploj de Grabowski,
Kabe kaj aliaj, ni presados nur tion, kio estos *stile sen-
riproĉa.*

Ni kore invitas polajn Esperanto-Verkistojn — kaj en
Pollando ili estas legionoj! — bonvolu kun ni kunlabori kaj
trakti nian gazeton kiel *publikan parolejon de pola esperan-
ta penso.* Ni volas arigi ĉirkaŭ ni ĉion, kio en esperantaj
sferoj sentas bezonon eldiri siajn ideojn, ni volas krei lite-
raturan centron, kies radioj kuros tra Pollando kaj Ter-
globo!

La fama voĉo kaj la plej nekonata trovos ĉe ni same
estimplenan kaj dankan akcepton, se ili nur alportos ion
vere valoran.

Polaj Esperantistoj!

Levigas por ni nova tago!

Warszawa donas la signalon!

Vi nun ĉiuj al ĝi respondu, ĉiuj laŭ Via eblo subte-
nu, disvolvnu, kreskigu la aferon!

Ni pruvu nian forton spiritan kaj volan. Ne manku
al la alvoko eĉ unu Esperantisto, en kies brusto batas
pola koro!

En Ago — Venko nia!

La Redakcio.

Al tutmonda Esperantistaro.

Samideanoj!

La voĉo de „Pola Esperantisto“ reprenas sian lokon en la diversnacia horo de Esperanta Gazetaro. Ne estos plu muta la tero, sur kiu vivis nia kara Majstro, sur kiu li naskis sian grandan, praktikan, belan kaj bonfaran donacon al la homaro. Zamenhof ne ĝisvivis la feliĉan momenton de liberigo de lia patrujo. La granda milito forpreninta tiom da oferoj, forrabis al la mondo ankaŭ tiunĉi genian koron, kiu ne povis surporti la ŝargon de sufero kaj malfeliĉo de aliaj.

En la hodiaŭa solena momento, kiam post tre longa silentado nia gazeto unuafoje aperas sen kontrolo de fremda cenzuro, kiam ĝi do festas duoblan ĝojon: de reviviĝo kaj liberigo nia pia memoro al la Kreinto de Lingvo Internacia ordonas al ni komenci tiun ĉi saluton al alilandaj fratoj per kelkaj almenaŭ vortoj pri tio, kio en la socia agado de Doktoro Zamenhof estis plej persona, kio plej bone pentris la dezirojn de lia koro kaj la celon al kiu li iris—la Interna Ideo de Esperanto. Oni parolas pri ĝi diverse kaj abunde; unuj estas ĝiaj fervoraj amikoj, aliaj neas ĝian bezonon.

Estas fakto neduba, ke Esperanto per si mem, kiel lingvo, prezentas jam kompletan tutajon, objekton large sufiĉan al la homa intereso kaj interesiĝo. Certe, Esperanto *povas* vivi sen la idealoj, klujn oni ligas kun ĝi. Sed estas ankaŭ fakto, universale konata, ke preskaŭ ĉiu esperantisto ame konservas en la memoro la spiritan testamenton de nia Majstro, la eternan ideon pri paco kaj frateco de ĉiuj popoloj:

„Ni inter popoloj la murojn detruu“!

Tiu devizo enradikiĝis en sangon kaj animon de ĉiu vera fervorulo de Esperanto. Kiel ajn oni imagas la estonton de homa kunvivo sur la tero, oni devas konsenti, ke *lingvo internacia celas la internacian kompreniĝon*. Kompreniĝon ne nur vortan, sed ankaŭ tiun pli profundan, kiu ekkoninte la alilandanon rekonas en li fraton-homon.

Ni ŝuldas al nia Majstro skribi orlittere sur niaj standardoj tiun grandan logikan veron! Ni ŝuldas al li des pli, iri en la vojon, per li montritan, almenaŭ ĝis la punkto pri kiu ĉiuj devas esti konsentaj.

Esperanto farigu laŭpove la ilo de reciproka ekonomo de nacioj.

Jes, la kaŭzo de intergenta malamo estas plej ofte nescio. La homo amas sian patrujon, li konas kaj ŝatas la trezorojn de ĝia kulturo, la ordon de ĝia socia vivo, li estas kunigita per mil ligiloj kun la aliaj homoj, kiuj vivas en ĝi. Se li ne parolas fremdan lingvon, li scias tre malmulte kaj neprecize pri fremdlando. Li estas por li ia stranga *nekonato*, laŭfoje minaca, ĉiam malproksima. Li kredos facile pri ĝiaj danĝeraj intencoj. Kelkaj ektaŭsoj de lerta kaj konscie falsa propagando kreos en lia cerbo plene fantazian imagon pri tuta popolo! Li, nature, ne havas tempon mem studi la aferon. Oni diros al li: „barbaroj volas fari malbonon al via patrujo“ — kaj li blinde atakos la „barbarojn“!

Jen, en sia tuta nudo, la psikologio de plejparto da sangaj buĉadoj, kiuj piedpremas la homan kulturon, jetas teren altajn idealojn kaj kaŭzas morton de milionoj!

La Lingvo Internacia estas genia eltrovo, kiu faras la homon komprenebla al la tuta mondo. Ĝia rolo en la atingo de la idealo de Eterna Paco povas esti nekalkuleble granda, se oni volos konscie kaj saĝe apliki ĝin al tiu celo.

Sen ia dubo, la hodiaŭa Esperantistaro ĉefe devas propagandi kaj diŝvastigadi la lingvon mem. Ni ne forgesu tamen pri nia spirita patro Zamenhof kaj pri lia plej kara deziro: ni laŭpove estu *jam nun* propagandistoj de internacia proksimiĝo.

Ni memoru ankaŭ, ke la lingvo Esperanto estas nur *perfekta instrumento*. Ju pli utila ĝi montriĝos praktike al la homaro, des pli rapide la homaro ĝin akceptos.

Gvidataj de supraĵ konsideroj, ni decidis krei en nia revuo *fakon pri Pollando*. Ni plezure vidus la ekzemplon sekvata de alinaciaj esperantaj gazetoj. Tiamaniere ni plej bone pruvus ankaŭ la vantecon de ofta kulpigo, kiun kontraŭuloj de Esperanto faras al ĝi, nome, ke nia movado estas malhelpo al patriotaj sentoj, ke ĝi celas forigi la nacieleon!

Ĉe hodiaŭa soleno de „Pola Esperantisto“ dolore mankas ankaŭ tiu, kun ni kutimis nomi la „Patro de polaj esperantistoj“ kaj la „Princo de Parnaso“. Ni plu ne aliĝos en nia rondo la harmonian voĉon de Antoni Grabowski, cizelantan la juvelojn de lia inspirita muzo, Antaŭ sia tro frua morto, la plej granda ĝisnuna esperanta Poeto

plenumis gigantan verkon, kiun ni dum longaj jaroj ankoraŭ ne kapablos taksati laŭ ĝia plena valoro. La „Sinjoro, Tadeo“ estas vera minejo de spiritaj riĉaĵoj. Nur estontaj generacioj, devige instruitaj pri internacia lingvo kaj parolantaj ĝin sambone kiel la gepatran, povos ĝui facile la tutan belon de senmorta epopeo de Adam Mickiewicz.

Al ni, Poloj, Grabowski postlasis ekzemplon, kiu estas por ni kvazaŭ depostomba ordono: per ĉiuj fortoj akceli la perfektecon de esperanta literaturo, ne permesi ke pereu la ĝermoj, kiujn li semis, sed plue ilin prizorgi kaj disvolviĝi.

La „Pola Esperantisto“ havas fortan volon kun ŝila amo gardi tiun odorantan ĝardenon. Ĝi esperas ankaŭ, ke multaj koraj ligiloj, kiuj kunigas Polujon kun alilandaj esperantistoj, certigos al ĝi la varme deziratan kunlaboron de diversnaciaj amikoj.

Saluton, karaj Samideanoj! Memoru pri Pollando, patrujo de Esperanto, patrujo de Zamenhof kaj Grabowski.

Samideanoj el bonvalutaj landoj bonvolu subteni nin ankaŭ materiale, abonante multnombre la „Polan Esperantiston“. Pollando repagos tion al la Esperanta Movado!

La Redakcio.

POLLANDA FAKO.

Józef Piłsudski.

Ĉefo de la Pola Ŝtato.

Historio de renaskiĝinta Pollando prenis jam lin sur siajn potencajnflugilojn kaj alportis sur altecon de plej grandaj meritoj. Oni povas diri, ke de plej frua juneco akompanis lin ĉio, kio akompanas la penadojn de la herooj.

Se ni vivus en la tempo de legendoj, fama legendo ĉirkaŭvolvus lia jam dum nia vivo ĉar vere, legenda estas ĉio, kion li ĝis nun faris por sia patrujo. Por sendependeco de Pollando li batalis ne nur dum granda milito, sed multe pli frue ankoraŭ antaŭ ĝia eksplodo. Li militis ofte kontraŭ propra socio ne sufiĉe preparigita al grandaj

agoj, kontraŭ indiferenteco, kontraŭ manko de materialaj rimedoj por gvidado de konspiraj-organizoj, fine li batalis kontraŭ la organismo de lama rusa ŝtato, sur kies pola teritorio li konstante preparigadis la militan pretecon de Pollando.

Józef Piłsudski naskiĝis en jaro 1867 en Żułowo proksime de Wilno.

Edukata en epoko post la lasta pola ribelo kontraŭ



Roslanda registaro en 1863 j. li jam en Wilna gimnazio konatiĝis kun revoluciaj influoj kaj preparigadis al estontaj agoj. En jaro 1885 li forveturas al Harkova universitato, el kiu pro kontraŭstata agado li estis forpelita kaj elsendita Siberion por kvin jaroj.

Reveninte de tie al Warszawa, li kune kun aliaj, fondas Polan Socialistan Partion. Estante unu el la gvidan-

toj de tiu partio, li montras nelmageblan energion en la konspira agado kaj estante samtempe varma patrioto, li disvastigadis inter pola socialismo la kredon, ke unua paso por efektivigo de socialismo en Pollando estas akiri nacian sendependecon, kaj por ĝin akiri, nepre bezone estis prepariĝi por eventuala militio.

Venis revolucio en 1905 j. kaj por momento ekbrilis la espero, ke Pollando sukcesos liberiĝi, tamen, sufokita en la sango, revolucio baldaŭ finiĝis, sed ne finiĝis penoj por atingi la sendependecon.

Józef Piłsudski eniris la vojon, kiu superigadis homajn fortojn, li sola, ekkomencis la instruon de militscienco en Pollando.

En jaro 1910 en Krakovo, kie tiamaj aŭstriaĵoj legoj estis iom pli favoraj por nacia agado, li fondas la unuan militistan organizaĵon. Efektive, nelmageblan organizan kapablecon oni devis posedi, por ke el la aro de inteligenta junularo kaj studentoj, en la tempoj, kiam pri milito neniu pensis, krei militistan organizaĵon, kiu fariĝis embrio de nuntempa pola armeo.

Aglaj estis ĉiuj liaj faroj kaj en propra socio ofte ne guste taksataj; lia socialismo por socialistoj estis tro nacia, lia patrioteco por naciuloj ŝajnis tro proksima al senacieca socialismo kaj mi devas konstati, ke ĉiuj politikaj dogmoj batis en tiu granda koro stopitaj nur en unu eco—kompreno de ideo de patrujo. Kaj tio, ŝajnas al mi, estas plej granda eco de tiu granda homo, eco kiun oni povas destili el la suko de la tero kaj spiro de la ĉielo — talento de la kompreno de ideo de patrujo.

Do kiam, post kelkjaraj martiraj travivaĵoj dum granda milito, travivaĵoj, kiujn ne eble estas eĉ proksimume priskribi en tiu—ĉi malgranda skizo, fine al Józef Piłsudski, malfermis pordegon de Magdeburga malliberejo germana revolucio, li revenis al Warszawa en 1918 j.

En tiu historia por ni jaro, en tempo de renaskiganta patrujo, ĉies okuloj turniĝis al Józef Piłsudski, montrante lin, kiel homon, kiu sola scipovos ordigi la komenciĝantan organizaĵon de Pollando. Fine la unua pola Sejmo rekompencis lin per tio, kio estis la plej alta — kaj la plej inda al li, oni unuvene akklamis lin—ĉefo de la Pola Stato.

ZYGMUNT KRASIŃSKI.

Trapasanta nuboj *).

Mi volus ŝanĝi en tiun nubon, kurantan sur la flugiloj de la vento, mi volus esti anoncanto de tempesto aŭ sendito de la paco, kiam ĝi, kvazaŭ angelo de lumeco, argentbrilas ĉe la pledoj de leviganta luno. Mi povus tiam suprenflugi tra spacoj aeraj kaj etendigadi la blankan tendon super la turoj de la urboj kaj rokoj de la dezerto. Mi povus tiam, per mirakla forto, alligi en ian formon — esti neĝblanka spirito aŭ nigra satano. Mi povus disetendi flugilojn kaj en freneza kuro skuĝi per pluvo abunda, ĝis, lacigita, mi ripozus sur montpinto kaj ekdormus, kvazaŭ infano lulligita per spiro de la printempo. Mi povus ankoraŭ, levigante de la koro eternan sopiron, resti amanto de la nokto-regno kaj radian vizagon ŝanĝi ĉirkaŭprenkarese, aŭ per nova volupto kaptita, rekte de tiuj edziĝofestenoj leviginte al novaj baraktoj, fariĝi teruriganto de la homaro; mi ekpendus super la tero kvazaŭ krepo funebra, per mortkovrilo mi ĉirkaŭus la sunon, ĝis ĝemoj kaj petoj de la homoj atingus min en mia ĉielblua regno. Mi povus festeni inter la kristalaj ĉielatingantaj muroj de glaciaro, kurage traŝovigadi super la abismoj senfundaj kaj petoli sur la negaj altaĵoj, kuŝante sur la tapiŝo, per argentaj lilioj teksita — kaj post ripozo levigi, per la ventego vekigita kaj fratiginte kun tondro, donaci al ĝi reĝan tegon el la brillanta nebulo, troni el flamoj kaj nesanceblan fortikaĵon el kiu ĝi povus sur la mondon jetadi siajn fajrajn saĝojn.

Dum mi tiel revis, la trasfluganta nuboj malsuprenigis al mi kaj, divenante miajn kaŝitajn dezirojn, jene al ili respondis. Ho, ne enviu min, vi, malatentema! Mi ne envidon, sed la kompaton indas. Mia brilo kaj forto estas nur iluziaj ŝajnoj de la bedaŭrinda realeco. La sorto destinas min kiel eternan oferon de detruigantaj elementoj;

*) Ni turnas specialan atenton de niaj legantoj al tiu — ĉi traduko el la verkaro de la mondfama pola poeto. Ĝi pruvigas, ke Esperanto taŭgas perfekte al esprimo de plej komplikitaj juveloj de la poezia arto. *Red.*

eĉ dum mi estas malbenita efektiviganto de dia venĝo, mi devas morti, plenumante la verdiktojn de la Plejalta. Se mi ekbrilos iam per ĉielarkaj koloroj, do nur por mallonga momento; la radioj sunaj amuziĝas per mi, kvazaŭ intanoj per la brilanta amuzilo, baldaŭ frakasota kaj senzorge forĵetota.

Mi estas humila kortegano de ĉiu stelo, obeema servisto de la luno. Dum ordonite al mi estis ŝirmadi la sunon, mi sentas en mia sino ĝian mordante sufokan varmegon kaj terure turmentas min ĉiuj malbenoj de la homoj, vidantaj en mi ilian persekutanton. Dum mi pluvigas, tiam mi per propra sango ploras kaj kun la lasta larmino vivo de mi forkuras. Dum mi transportas la tondrojn, tiam koro mia krevas kaj tuta mia estaĵo, ĉifonigita, ree devas mizere pereli. Ofte fine, dum min matenruĝo vekigas, mi apogas min sur akra roko, longe suferante turmentojn de agonio; formo mia peco post peco disĝigas, ĝis mi entute foriĝos kvazaŭ vaporo, al neniu memorebla. Se mi naskiĝas en la momento de sunsubiro, mi devas la endormiĝantan sunon akcepti en mian virgan liton kaj tiam ŝanĝigita en vivantan ardon, mi mortsekiĝas, ne ĝis atendite la refreŝigan ĉirkaŭprenon de vespera venteto.

Se min naskis la noktaj mallumoj, malfelĉa estas mia sorto. Senĝita de la suno, kiu donas al ni brilojn, mi devas penti funebre vestita; mi klinas la hontigitan frunton kaj balanciĝas en la aero kvazaŭ pendigito, dum la steloj palpebrumas al mi per la mokanta malestimo. Dum tondroj ariĝas en la aero, mi devas antaŭen kuri, blinde obeema al tempesto, malgraŭ ke mi antaŭvidas, ke la akraj ponardoj de la fulmoj trapikos mian sinon, ke min la tondroj frakasos, kaj ke ventego elsiros al mi la flugilojn, ĵetante min en densan nebulabismon, al inferelspiroj similan, aŭ droniĝos min en ŝaŭmantaj ondoj de oceano. Ne miru do vi, rigardante min vagantan tra la vojoj ĉielaj, ĉar efektive mi frenezigiĝas inter abundo de turmentoj; kaj dum ĵetata kaj disŝirata, mi volviĝas ĉi-flanken, sovaĝe saltancante, ŝajnas al mi, ke mi sukcesos forkuri de malamika sorto. Sed vane! Mi estas ludilo de ĉiu venteto, de ĉiu radio. Foje, kvazaŭ reĝino en oro kaj purpuro mi regas sur ĉielo, foje ree mi estas kvazaŭ ĉifone vestita sklavino de aŭtokrata vento. Kvazaŭ titana reganto de la haremo, kiu kaprice mortkondamnas la odaliskon*), tiel suno per mi karesiĝas, ĝis momentan amatinon ĝi ĵetos de siaj ĉirkaŭprenoj al la morto.

*) Mahometana sklavino-amatino.

Mi naskiĝas sur aeraj senvojaj, mi vivas per mallonga vivo de insekto, estante samtempe la plej brilkolora papilio, tra lazuroj fluganta, kaj plej abomena amfibio en mallumo rampanta. Mi mortas ĉiumomente kaj konstante renaskiĝas, por eterne agonii. Sur ĉiu loko estas preta por mi lulilo kaj embuska tombo, kaj la sama vento kiu per gaja ekblovo salutas mian naskiĝon, per minaca ĝemo anoncas mian lastan spiron.

Diru nun, vi, kiu konas mian malgajan historion, ĉu vi volus ŝanĝigi ankoraŭ en nubon?

Mi malfermis la buŝon por respondo, dume, levigante la okulojn, mi jam ne ekvidis la nubon.

Ĝia destino plenumiĝis—ĝi pereis sen postsigno.

Tradukis S. K.

El Rimoj kaj Ritmoj.

*Se krevas kor'—el ĝlaj fendoj
Elkreskas flor' de rememor'
Trankvilaj ĝin moviĝas plendoj
Venen' eliras per odor'...*

*Venen' per bonodor' eliras
El sangkolora tiu flor'...
Dum nokt' sendorma vi ĝin spliras
Serĉante ĝuon en dolor'...*

*En rememor' vi amuziĝas,
Je multkolora florfoli'—
Visaĝ' paltiĝas... kaj paltiĝas...
Mortiĝas vin melankoli'...*

Leo Belmont.

Voĉo en dezerto.

*Ho, klal mi ne havas de spiritoj voĉon,
Fulmotondrojn en buŝo, tagigojn en spiro!
Ĉielen mi streĉiĝas sole per sopiro
Kaj vane sub steltronon ĵetas kor'-kartoĉon.*

*Ho, vane sub steltronon ĵetas mi kartoĉon —
Sklavo katenciŝta al tera ĉartiro,
Ĉar pensoj la fleraj estas nur deliro
De animo freneza... Tlal nur riproĉon*

*Mi sendas sub la stelojn, mi de steloj flto.
Kanto mia ne tuŝas la tronon revltant!
Nur sur tero sopire larmas hom-pupilo.*

*Kiel stelo brilanta, kiel pal'—radio...
Kaj nur homoj ĝin povas aŭdi neauditan
Kaj eble en ĉielo ĉionscia Dio.*

Stanisław Braun.

KRONIKA ESPERANCKA.

— W Helsingforsie (stolica Finlandji) odbył się w sierpniu XIV Wszecławiatowy Kongres Esperancki, przy udziale z górą tysiąca przedstawicieli 35 narodowości. Polskę reprezentował b. Wiceprezes Polskiego Tow. Esperantystów, Dr. Emiljan Loth, a do grona Wiceprezesów Narodowych Kongresu zaproszono z Polski p. Stanisława Essigmana, wybitnego esperantystę warszawskiego, obecnego członka Zarządu i honorowego skarbnika P. T. E. Znakomita organizacja kongresu jest przedmiotem ogólnych pochwał. Kongresowi udzieliły bardzo wydatnego poparcia władze państwowe śląskie, a Prezydent Rzeczypospolitej, pod którego wysokim protektoratem

kongres się odbywał, podejmował jego uczestników na specjalnym przyjęciu.

Zasługuje na uwagę nadzwyczajne zainteresowanie się prasy sprawą kongresu i Esperanta wogóle. Mamy przed sobą szereg wielkich dzienników fińskich, wypełnionych niemal wyłącznie artykułami i informacjami o Esperancie. Nie brak nawet całej serii zręcznych karykatur znakomości esperanckich! „Finlandja zdobyta dla Esperanta”!—oto powszechne zdanie uczestników różnej narodowości, z którymi mówić mieliśmy sposobność w czasie ich powrotu przez Warszawę.

W dziejach ruchu esperanckiego kongres helsingforski zaznaczył się przyjęciem krótkiego statutu Powszechnej Organizacji Esperanckiej, o której pisać będziemy obszerniej w dziale „Esperanta Movado”.

Następny, XV Kongres Esperancki odbędzie się w Norymberdze, nie zaś w Warszawie, jak to sobie tutaj wielu projektowało. Przyczyną tej zmiany była opinia międzynarodowego Stałego Komitetu Kongresowego („Konstanta Kongresa Komitato”), podzielona jednomyślnie przez wszystkich przedstawicieli Polski na kongresie, że trudności techniczne, zwłaszcza mieszkaniowe, są jeszcze w Polsce zbyt znaczne, aby można ryzykować zaproszenie już w roku przyszłym kilkudziesięcym, wedle przewidywań, kongresu. Musimy więc czekać rok jeszcze! Skupiajmy nasze siły, aby godnie odpowiedzieć oczekiwaniom.

— Dnia 4 września 1922 r. odbyło się w Warszawie pierwsze organizacyjne posiedzenie udziałowców spółki wydawniczej p. n. „Pola Esperantisto” („Esperantysta Polski”). W dniu tym zadeklarowało swe przystąpienie 9 osób z kapitałem 240.000 mkp. Wysokość udziału określono na 10.000 mkp. Statuty Spółki są w opracowaniu. Nowych udziałowców przyjmować będzie Ogólne Zebra-
nie. Łaskawe zgłoszenia z podaniem liczby żądanych udziałów kierować należy na ręce Administracji pisma „Pola Esperantisto”, które jest pierwszym przedsięwzięciem Spółki. Na Redaktora Naczelnego i wydawcę pisma zebrań powołali jednogłośnie wybitnego poetę esperanckiego p. Stanisława Kałoczyka, do Komitetu Redakcyjnego zaś pp. Dr. Antoniego Czubyński, Jana Kostekiego, Antoniego Stankiewicz; na Sekretarza Redakcji: p. Czesława Pruskiego.

— W Polskim Towarzystwie Esperantystów w Warszawie (Królewska 19) odbędzie się dn. 18 b. m. (czwartek) o godz. 8 w. „Wieczór Korespondencji“. Nadeszło dotąd z górą 100 widokówek z różnych krajów świata, które będą rozlosowane między obecnymi. Członkowie Towarzystwa proszeni są o przygotowanie zawczasu pewnej ilości pocztówek (widoki Warszawy, reprodukcje sztuki polskiej), zaopatrzonych w znaczki pocztowe po 60 mkp.

— Dnia 25 września odbyło się ogólne miesięczne zebranie Pol. Tow. Esp. w lokalu własnym, Królewska 19. P. Stanisław Essigman w barwnych interesujących słowach dawał sprawozdanie z międzynarodowego kongresu w Helsingforsie. Na porządku dziennym dalej była poruszana sprawa szybszego rozwoju Pol. Tow. Esp. w roku bieżącym. Ażeby urozmaicić i ożywić działalność towarzystwa stworzono kółko dramatyczne i chór esperancki. Następnie postanowiono prowadzić równoległe dwa kursy języka Esperanto niższy i wyższy. Sprawę powołania do życia sekcji propagandy i sekcji dochodów niestałych, zebranie po ożywionej dyskusji poleciło zorganizować zarządowi.

— Dnia 10 września komisja 5 Ligi Narodów zajmowała się sprawą Esperanta jako języka pomocniczego. Szczególnie przychylnie do sprawy tej odnoszą się delegat pol. Afryki Lord Robert Cecil, delegat Japonji, Dr. Inaz Nitobe i inni. Po wyczerpującej dyskusji komisja, 5-ta poleciła referować sprawę Esperanta na plenarnym posiedzeniu Ligi Nar. delegatowi Francji p. Reynald.

ESPERANTA MOVADO.

Pola Esperantista Societo.

Estonta historiisto de Pola Esperantista Societo, kiu el malnovaj libroj kaj kovritaĵoj per polvo arkivaj kolektados la sciigojn pri pena batalado de unuaj laborantoj por Esperanto, sur la pola tero estos certe kortuŝita kaj estime impresita per la impona bildo, kiu tom post tom prezentigos al liaj okuloj. Ĉar tie, vere, dum la unua pléj malfacila epoko, batis la koro de Esperanta Movado.

Fondita en 1906, kiel unu el la unuaj en la mondo naciaj societoj esperantaj, P. E. S. tuj fariĝas centro, de kie la esperanta spirito per fadenoj de literatura talento kaj senta fervoro komencas kurti kaj radii al la plej malproksimaj landoj de la globo.

Nia neforgesebla Majstro, ĝia Honora Membro, vizitas ofte kun sia estimata Edzino la modestajn salonojn, kie oni jam parolas lian junan artefaritan lingvon. Kaj kiel parolas!

Tie kolektiĝis ja potenculoj de la vorto, kies sonoj, ĝis nun nekompreneblajn al homaro, scias ornami per ritmo kaj ritmo, vivigi per la ardanta forto de sia penso, subjugonta malgraŭvole milojn da indiferentuloj, sononta firme tra dekjaroj, ĉiam pli laŭte kaj vaste, ĝis la akiro de koroj de tuta homaro, ĝis la venko de Esperanto! Mi vidas iliajn nomojn, gravuritajn sur granita monumento, kiun la danka amo de popoloj konstruos al Pioniroj de la Lingvo: Grabowski, Kabe, Belmont, Leono kaj Felikso Zamenhof, Zakrzewski, Brzostowski, Günther, por citi nur la ĉefajn. Sekvataj de malgranda sed fidela taĉmento de aliaj, malpli famaj kaj same fervoraj, ili en plej malfacilaj cirkonstancoj de politika mallibero, sub regado, kiu intence sufokadis la klerecon kaj premis ĉiun streĉon al kultura progreso—fondas la esperantan movadon en Pollando, kaj ne kontentigante per la agado en sia propra patrujo, preskaŭ de la komenco kreas unu el la plej bone redaktatajn gazetojn esperantajn, la belan, riĉan, perfektan stile „Polan Esperantiston“, kiu fariĝas aŭtoritato por tuta esperanta mondo.

Nune malgrandiĝis la „anaro de plej frua hor‘“. Kelkajn de la plej grandaj forprenis la morto, aliaj plu ne sentas en si junajn fortojn. Sed restis la Verko. La semoj alportis novajn fruktojn. Ventego de la mondmilito forblovis de Pollando la katenojn. Pli novaĵ, se ne ĉiam pli junaj esperantistoj reprenas la saman taskon.

Ankoraŭ ne ĉesigis la terura batalo, kiam, en februaro 1918, reorganizita P. E. S. rekomencas sian agadon. Dum nelonga tempo ĝi havas ankoraŭ la feliĉon kaj honoron esti gvidata per sia malnova eminenta Prezidanto Grabowski. Sed liaj fortoj pli kaj pli falas. Anstataŭas lin digne la okdekvinjara, mirinde tamen juna spirite kaj fervore, S-o Bronisław Szczepankiewicz, nune Honora Membro, al kiu ni ĉiuj sildas grandan dankemon por la ekzemplo de lia senlaca entuziasmo. Sub lia gvidado kaj

sub la sperta prezidanteco de lia sekvinto, Dro Jerzy Loth, la Societo kreskas rapide. Krom la Varsovia Centrejo, ĝi nun enhavas grupojn en 10 provincaj urboj: Kraków, Poznań, Wilno, Łódź, Kalisz, Koluszki, Pabjanice, Ruda Pabjanicka, Siedlce, Zduńska Wola. Per hodiaŭa reviviĝo de la „Pola Esperantisto“, dume en multe pli modesta vesto ankaŭ por P. E. S., estas farita decida paŝo antaŭen, estas forĝita kora ĉeno al la pasinta periodo.

Ĉiuj do al la komuna laboro!

La estonto alridas nin!

Jan Kostecki.

KOMUNIKOJ.

Pola Esperantista Societo.

La Centrejo (Warszawa, Królewska 19). *Kunventagoj* estas lundo kaj ĵaŭdo de 8 ĝis 10 h. v. De la 1-a septembro oni komencis akcepti enskribojn por *kursoj* komenca kaj supera.

La Centrejo petas la Grupojn, kiuj ankoraŭ ne respondis la *ĉirkuleron*, dissenditan en julio, ke ili bonvolu kiel eble plej baldaŭ alsendi sciligon pri loko kaj tempo de kunvenoj kaj ankaŭ la nomaron de estraranoj kun iliaj adresoj.

La Administracio de „Pola Esperantisto“ sendas al *ĉiuj Grupoj de P. E. S.* certan nombron da gazetekzempleroj kun peto pri disvendo kaj akceptado de abonoj. La Estraro de P. E. S. *varme subtenas* tiun ĉi peton. La liston de abonantoj la Grupoj bonvolu adresi al Administracio de Pola Esperantisto, la monon al P.K.O. № 3874.

Grupo Poznań (adreso ĉe sekretario, S-ro Henryk Lewandowski, Wjazdowa 10 I) bozonas propagandan materialon, eventuale aĉetus broŝurojn, foliojn, insignojn. Helpu!

Grupo Łódź. Ni sciligas, ke nia tre fervora kaj meritoplena lodza Membro, S-ro Włodzimierz Pfeiffer, transloĝiĝas al Katowice. Ni kore deziras al li bonsukceson sur nova, pli alta posteno.

La korespondon al Grupo Łódź oni adresu de nun
al la Prezidanto, Dro A. Goldenberg Nawrot 38.

Grupo Siedlce (Długa 3) scilgas nin pri vigla propa-
gando komencata. Varmajn bondezirajn!

OD ADMINISTRACJI.

Numer niniejszy wysyłamy wazytakim esperantystom polskim,
których adresy znamy, z prośbą o zaabonowanie pisma.

Prenumeratę opłacić można w lokalu administracji, Królewska 19,
lub czekiem P. K. O. № 3874.

PRZEGLĄD ŚWIATOWY

(La Monda Revuo)

plej granda ilustrita revuo en Pollando.

A Ĉ E T E B L A Ć I E

Centra redakcio kaj administracio Warszawa, Sienna 23.

Oni korespondas esperante.

ENHAVO: *La Redakcio*: Al Polaj Esperantistoj. — *La Redakcio*:
Al tutmonda Esperantistaro. — *St. Karolczyk*: Józef
Piłsudski. — *Tradukis S. K.*: Trapasanta nuboj. — *Leo*
Belmont: El Rimoj kaj Ritmoj. — *Stanisław Braun*: Voĉo en
dezerto. — *Kronika* esperanta. — *Jan Kostechi*: Pola Espe-
rantista Societo. — *Komunikoj*. Pola Esperantista Societo.

Abonprezo por 12 numeroj: 3,600 pol. mar., 1,20 dolaro, 360 guld.
6 sved. kr., 6 svis. fr., 6 dan aŭ norv. kr., 6 pesetoj, 3 ŝilingoj 9 frf.,
12 lir., 24 fmk., 24 ĉ. kr., 600 gmk., 240 hung. kr., 24 000 aŭstr. kr.,
6 baltoj kaj balk. ŝtatoj 7 200 pmk. aliaj landoj 5 oraj fr.

Redaktoro kaj eldonanto: STANISŁAW KAROLCZYK.

Redakcio kaj administracio: Warszawa, str. Królewska 19

Funkcias nur lunde kaj ĵalĉde de 8—10 h. vespere.

Presejo: Wacław Maślankiewicz. Warszawa, Nowogrodzka 17.